

## Kelkaj vortoj pri la x-a skribometodo

Uzi la x-metodon por ekzemplaj frazoj en nacilingva teksto pri Esperanto estas same **informada erarego** kiel paroli pri "dua lingvo por ĉiuj" aŭ pri "universala" lingvo.

La x-metodo havas grandan malavantaĝon por varbado pro sia stranga aspekto:

**Imagu ke vi neniam aŭdis pri iu internacia lingvo nomita "Esperanto".**

**Imagu ke vi vidas ekzemplan tekston en tiu lingvo.**

**En du vortoj el tri estas "x" literoj.**

**De kie vi sciu ke tiuj strangaj iksoj estas nur konvencio anstataŭ supersignoj?**

**Kio estos via reago kiam vi provos laŭlegi tiujn frazojn?**

**Ĉu tio helpos havi bonan opinion pri tiu strangaspekta lingvo?**

Dekstre: jen kio okazas, kiam oni uzas la x-metodon. Mencio de Esperanto en la fama franca revuo Science et Vie (oktobro 2006) estas fuŝita pro ikso en la unua frazo:

Kiam ne eblas printi la ĉapelitajn literojn, **en varboteksto/ekzemploj** evitu uzi la x-metodon. Elektu frazojn, kiuj ne enhavas ĉapelitajn literojn, uzu la h-metodon aŭ simple ne metu la supersignojn.

Ekzemple:

"Mi parolas Esperanton"

"Ĉu vi parolas Esperanton?"

"Ĉu vi parolas Esperanton?"

sed ne "Cxu vi parolas Esperanton?"

Lastatempe rokgrupo ŝanĝis sian nomon de "Dolcxamar" al "Dolchamar".

En Libera Folio, la ĉefkantisto klarigas:

**"Ni rimarkis, ke en la amaskomunikiloj ne eblas uzi ĉapelojn, kaj pro la x-sistemo ĵurnalistoj tutdiate prononcis niajn nomojn"**

<http://www.liberafolio.org/2006/dolchamar/>

Sekvinda ekzemplo...

### QUE DEVIENT L'ESPÉRANTO ?

*Cxu vi parolas esperanton ?*  
Si, à cette question, signifiant "Parlez-vous l'espéranto", vous répondez par l'affirmative, c'est que vous faites partie des 2 millions de personnes qui, dans le monde, maîtrisent cet idiome. Créé en 1887 par le médecin polonais Ludwik Zamenhof, l'espéranto avait pour vocation de devenir une "langue internationale" maîtrisée par tous en tant que deuxième langue, pour favoriser la communication entre les différentes cultures. Inspirée des langues indo-européennes, sa structure linguistique est simple, afin de pouvoir être rapidement acquise (de 6 à 8 mois). Malgré le nombre modeste de locuteurs, l'espéranto continue de se diffuser lentement, bénéficiant de l'essor d'Internet.

Ĉiuj konsentas, ke la normala alfabeto de Esperanto (unu litero <=> unu sono) estas grava eco por internacia lingvo. La aliaj skribmanieroj estas nur portempaj teknikaj solvoj.

Pro la malfacileco skribi ĉapelitajn literojn, en la reto ĉefe disvastiĝis la x-metodo. Se iu ekkuzas alian metodon (ekzemple "h" proponita de Zamenhof) tuj aŭdiĝas la kutima argumento de la x-emuloj kiu estas, ke ilia metodo pli bonas ol la h-metodo por aŭtomata vicordigo de vortoj aŭ konvertado. Sub la premo de la amaso ankaŭ mi uzis la x-metodon dum jaroj.

Per la h-metodo la lingvo aspektas pli natura, ĉar "h" estas uzata en multaj lingvoj por ŝanĝi la valoron de la litero, kiu estas antaŭ ĝi. Ekzemple:  
itale "chiave", "chiamare", "orecchio", "ghepardo", "preghiera", lunghezza"  
angle "choose", "which", "fish", "ship"

*"Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u"*

L. L. Zamenhof, Unua libro.



Cetere se oni bone pripensas la x-metodo eĉ ne estas multe pli bona por komputila uzo ol la h-metodo:

Por retmesaĝado ambaŭ same bonas (kiu vicordigas laŭalfabete la enhavon de letero?).

Por pli serioza redaktado ambaŭ maltaŭgas:

x pro "Chaux-de-Fond", "auxiliary", "auxiliaire", "Bordeaux", "Malraux", "Linux", "delux" ktp...

h pro "senchava", "bushaltejo" ktp...

Tial seriozaj redaktantoj de gazetoj ĝenerale uzas "ĥ" (kiu iom distranĉas la vortojn).

**Por interna uzo mi havas nenion kontraŭ la x-metodo, mi nur ne ŝatas, ke kelkaj el ĝiaj subtenantoj daŭre diras, ke ĝi estas pli bona ol la (fundamenta) h-metodo kaj mi bedaŭras, ke tro multaj uzas iksojn en ekzemplaj frazoj por neesperanto-parolantoj.**

Kelkfoje la x-emuloj timas ke la h-metodo riskas tute anstataŭigi la supersignojn. Mi neniel apogas tiujn, kiuj volas tute anstataŭigi la normalan alfabeton per la h-metodo. "Unu litero - unu sono" estas grava eco de internacia lingvo. Laŭ mi 99.9999% de la uzantoj de la h-metodo neniel volas forigi la ĉapelojn el la lingvo. Tiun argumenton oni povus fakte returni kontraŭ la x-metodo ĉar kelkiu eĉ jam eldonis (paperan) libron per la x-metodo.

Se vi skribas por komputiloj uzu la x-metodon, sed se vi skribas por homoj ne uzu ĝin (krom se vi volas ke Esperanto konkurencu la klingonan lingvon aŭ en kelkaj landoj kiel Eŭskio kaj Ĉinio).

*Atendante la plenan disvastiĝon de Unikodo, uzu prefere la fundamentan alternativon: la h-metodon.*

Se ĝenas vin la eventualaj maloftaj problemoj dum komputila redaktado uzu la "c" aŭ la "c^" metodon.

Nuntempe disvastiĝis ankaŭ la 'c (antaŭa apostrofo) metodo. Ĉefe inter italoj.

En la 1890-aj jaroj en letero al la ĉefa gazeto redaktita de Zamenhof oni ankaŭ proponis la "c`" (posta inversa apostrofo) metodon :

*Sinjoro Fr. VI. Lorenc konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ` ili kaj anstataŭ` "h" - apostrofon returnitan post la litero; ekzemple "ac`eti" anstataŭ` "aĉeti" au "acheti". De nia flanko ni devas nur peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo. La Esperantisto 1890 N-ro 23 paĝoj 54-55*

**Do prefere ne uzu la strange aspektan x-metodon, nek devigu la homojn instalii litertipojn por povi legi viajn leterojn au` hejmpaĝon.**

**Resume: kiam ne eblas uzi la veran alfabeton, kiam vi skribas por homoj prefere uzu la h-metodon, kiam vi skribas por komputilo vi povas uzi la x-metodon.**

Pliaj legaĵoj:

- **Angulo de la x-emuloj:**
- [Solena deklaro de la Iksisma Manifesto Dmitri HOROWITZ](#)



- [Iksoj Michiel Meeuwissen](#)
- <http://www.2-2.se/en/24.html> (vidu sub Alfabeta)
- <http://www.gvidilo.org/>
- [Iksemuloj havas eĉ la retejan lokon: http://www.ikso.net](http://www.ikso.net)

- [Rimarkoj de Nikolao GRISHIN pri tiu temo](#)

**ELCXENIGU  
LA VERDAN!**



**WWW. LERNU.NET  
ESPERANTON**

- Paragrafon ses (pri interreto) de la [manifesto de AKE](#)
- [Nacilingva hejpaĝo de Xone pri tiu-teme](#). (ligo ne plu funkcias?)
- En "Lingva planado kaj leksikologio" en sia kritika trarigardo de la provoj modernigi la Fundamentan alfabeton de la komenco ĝis 2001 Ottó HASZPRA listigas la diversajn proponitajn skribsistemojn.
- SoftKonvert: konvertilo por Esperanto-literoj inter x, h, lat3, fel, antaŭ`a ^, posta ^, posta ', renversita apostrofo ` kaj unikodo metodoj (cx, ch, æ, â, ^c, c^, c', ĉ, Ä□).

Rimarko 1: estas fakto, ke per la h-metodo kelkaj vortoj aspektas iom aĉe, ekzemple "shanghighi".

Sed la granda plimulto kiel "shi", "chevalo", ktp... ne ŝokas la okulojn de "ekstera" leganto, kiel ĉiu vorto enhavanta ikson.

Rimarko 2: en la metodo proponita de Zamenhof notu, ke "ŭ" skribiĝas "u" sen aldono de "h".

Kelkaj kiel ekzemple ERA skribas! "Euhropo", kio ne aspektas tro bele.

[Opinionketo "Patro nia" en x-metodo kaj alia metodo.](#)

[Thierry SALOMON](#)

<http://interpopolalingvo.inf.hu>

ehxo sxangxo cxiu jxauxde EHXO SXANGXO CXIU JXAUXDE

+ facile tajpebla.

+ konservas la alfabetan vicordon ("sx" post "s" ktp...)

- aspektas klingone.

- "x" trovigxas en nacilingvaj tesktoj

"Chaux-de-Fond", "auxiliary", "auxiliaire", "Malraux", "Linux"

do ne vere uzebla por aŭtomata konvertado

eh`o s`ang`o c`iu j`au`de EH`O S`ANG`O C`IU J`AU`DE

renversita apostrofo

+ ne tro distranĉas la vortojn

+ "`" ne troviĝas en normala teksto,

do uzebla por aŭtomata konvertado

- ne konservas la alfabetan vicordon

e`ho `san`go `ciu `ja`ude E`HO `SAN`GO `CIU `JA`UDE

antaŭa renversita apostrofo

+ ne tro distranĉas la vortojn  
+ "`" ne troviĝas en normala teksto,  
do ĝi estas uzebla por aŭtomata konvertado  
- ne konservas la alfabetan vicordon

ehho shangho chiu jhaude EHHO SHANGHO CHIU JHAUDE  
+ facile tajpebla. Aspektas pli nature ekz. itale "chiave",  
"chiamare",  
"orecchio", "ghepardo", "preghieria", lunghezza"  
angle "Who", "what", "which", "fish", "ship"  
+ proponita de Zamenhof  
- problemoj kun nacilingvaj vortoj, kaj kun kelkaj eo-vortoj  
kiel "senchava", "bushaltejo", ktp...

eh^o s^ang^o c^iu j^au~de EH^O S^ANG^O C^IU J^AU~DE  
+ au~tomate konvertebla  
- distranc^as la vortojn. Ne konservas la alfabetan vicordon  
por la etaj literoj

e^ho ^san^go ^ciu ^ja~ude E^HO ^SAN^GO ^CIU ^JA~UDE  
+ iom malpli distran^cas ^car por oftaj vortoj "^ciu", "^si"  
"^gi"  
- Ne konservas la alfabetan vicordon

eh'o s'ang'o c'iu j'au'de EH'O S'ANG'O C'IU J'AU'DE  
Itala  
+ malpli distranc'as la vortojn ol ""  
- miskomprenbla: en la unuaj jaroj de Eo oni uzis apostrofon  
por distranĉi la radikojn kaj okazis miskomprenoj: ekzemple  
c'iu aspektas kiel du vortoj: "c" kaj "iu"  
- kolizias kun normala apostrofo  
- ne konservas la alfabetan vicordon

e'ho 'sang'o 'ciu 'ja'ude E'HO 'SAN'GO 'CIU 'JA'UDE  
+ malpli distranc'as la vortojn ol ""  
- miskomprenbla: en la unuaj jaroj de Eo oni uzis specialan  
signeton por distranĉi la radikojn kaj okazis miskomprenoj:  
ekzemple c'iu aspektas kiel du vortoj: "c" kaj "iu"  
- kolizias kun normala apostrofo  
- Problemo dum konvertado: de l'homo, Mc Donald's, Andrew's,  
'stas,  
- Ne konservas la alfabetan vicordon

eh\*o s\*ang\*o c\*iu j\*au\*de EH\*O S\*ANG\*O C\*IU J\*AU\*DE  
stela metodo.  
+ "\*" facile tajpebla.  
+ plac\*as al stelemuloj ;) .  
- "\*" ofte estas uzata en komputilaj programoj por sekvo da  
literoj  
ekzemple por anstatau\*igo  
- Ne konservas la alfabetan vicordon

eh>o s>ang>o c>iu j>au<de EH>O S>ANG>O C>IU J>AU<DE  
okcidenta vento

+ sufic>e bone aspektas  
- Ne konservas la alfabetan vicordon  
- Problemoj kun la html formato

eh}o s}ang}o c}iu}j}au{de  
+ konservas la alfabetan vicordon  
+ ne tro distranĉas la vortojn

eh~o s~ang~o c~iu j~au~de EH~O S~ANG~O C~IU J~AU~DE  
serpenta  
+ konservas la alfabetan vicordon  
- en vortaroj "~" ofte estas mallongilo por la pridifinata vorto

eh#o s#ang#o c#iu j#au#de  
eh|o s|ang|o c|iu j|au|de  
eh)o s)ang)o c)iu}j)au(de  
eh=o s=ang=o c=iu}j=au=de  
eh-o s-ang-o c-iuj-au-de  
eh"o s"ang"o c"iu}j"au"de (Kalocsay)  
eh°o s°ang°o c°iu j°au°de  
eh\_o s\_ang\_o c\_iu j\_au\_de  
eh:o s:ang:o c:iu j:au:de  
s²uoj ³µ

e`ho `san`go `ciŭja`ude

e|ho |san|go |ciu|ja|ude

e[ho [san[go [ciu[ja]ude

e{ho {san{go {ciu{ja}ude

e/ho /san/go /ciu/ja/ude

e°ho °san°go °ciu °ja°ude

e\_ho \_san\_go \_ciu\_ja\_ude

e~ho ~san~go ~ciu~ja~ude

e#ho #san#go #ciu#ja#ude (kiel en muziko)

e:ho :san:go :ciu:ja:ude

e'h`o 's`an`g`o 'c`iu 'j`a`u`de E'H`O 'S`AN`G`O 'C`IU  
'J`A`U`DE

adieux afflux antiauxin, auxanometer, auxiliar bauxite bruxism  
flux, deluxe  
dux influx lux microlux Luxemburg redux reflux, tuxedo  
duxford

adieux bordeaux jeux, bureaux  
Roux, Doux

qwyx  
ehyo syangyo cyiu jyauyde

eh%o s%ang%o c%iu j%au%de EH%O S%ANG%O C%IU J%AU%DE

eŒo pan&oslaŝ;i&oslaŝ;o æiu ¼ayde E|O ÐAN&Oslaŝ;O ÆIU ¬AÝDE  
Lat-3  
- bezonas litertipon

eÄŸo Å□anÄ□iÄ□o Ä□iu ÄµaÅ&ŝy;de EÄºO Å□ANÄ□O Ä□IU Ä´AÄ¬DE  
Unikodo

+ plej bona solvo post 2-3 jaroj  
- bezonas litertipon kaj modernan komputilon